

Hermann Claudius,

Ŝanĝiĝas daŭre ĉio

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ŝanĝiĝas daŭre ĉio
En tiu mondo ĉi.
Sed sama restas Dio,
la mondon tenas Li.

Kaj kio ajn alvenos,
nur estas Lia ag',
la mondon Li plutenos
ĝis la plej lasta tag'.

La homoj elektitaj
por la anar' de Di'
ja estas nek perditaj
nek sen la grac' de Li.

*Traduko de la Germana poemo "Es wandeln sich die Reiche" de HERMANN CLAUDIUS (Hermano Klaŭdio, *1878-10-19 – †1980-09-08) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984.*

MR-099-1 / Arg-342-686 (2007-04-24 11:38:10)